


kontakto



Volumo 10, n-ro 1, 1973

Kontakto, majo 1973

revuo de
TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

REDAKTOROJ:

Vim Jansen
Ulriĥ Lins
Simo Milojeviĉ

ADRESO DE LA REDAKCIO:

Simo Milojeviĉ, Holysingel 476, Vlaardingen 3170, Nederlando.

Administrerejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, adresŝanĝojn, reklamojn ktp.: **KONTAKTO**, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. **Banko**: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam 3001, Nederlando. **Poŝta ĝirkonto**: 378964 (UEA).

Estraro de TEJO

Prezidanto: Renato Corsetti, Corso Lione 36, I-10141 Torino, Italio.

Ĝenerala Sekretario: Flora Szabó-Felső, Várady A. u. 4, Pécs, Hungario.

Kasisto: Ian Parker, North.Gen.Hospital Ferry Rd. Edinburgh, Skotlando.

Vicprezidanto: Hans Eichhorn, Rosenfelderstr. 2A, DDR-113 Berlin, GDR.

Vicprezidanto: Tomas Jansson, Sturegatan 12B, 2tr.S-75223 Uppsala, Svedio.

Abonprezo: 8 ned.gld. jare (por gejunuloj ĝis inkl. 25 j. nur 5 ned.gld.); kun la revuo *Esperanto* kaj la Jarlibro de UEA: 22,50 ned.gld. (gejunuloj ĝis inkl. 21 j.), respektive 30.- ned.gld. (por gejunuloj ĝis inkl. 25 j.); kun la bulteno *Novaĵoj de TEJO*: minimume 16 ned.gld. (Patronaj Membroj).

Unuopa ekzemplero: 2,20 ned.gld.

Reklamtarifo: 95 ned. gld. por tuta paĝo, 55 ned. gld. por duona paĝo, 35 ned. gld. por kvarona paĝo.

Kompreneble, ke pri la enhavo de unuopaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj, kaj ne la Estraro de TEJO aŭ la redakcio.

Vicprezidanto: Hans-Michael Maitzen, Astronomisches Institut Ruhr Universität, D-433 Bochum, FRG.

Membroj:

Senad Čolić, Halilbašića 23, Sarajevo, Jugoslavio.

Claude Nourmont, 8 rue des F. Lumière, F-77 Melun, Francio.

Janusz Wolak, ul.Kujawska 24, Sopot, Pollando.

Aliĝintaj landaj sekcioj

Argentino: Bv.Oroño 866 A, Rosario.

Aŭstralio: I.Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia 3155 Vic.

Aŭstrio: Hochsteingasse 16, A8010 Graz.

Belgio: P.Peeraerts, Drakenhoflaan 97, B-2100 Deurne.

Brazilo: Caixa Postal 18—ZC 00, Rio de Janeiro.

Britio: M.Reed, 59 Mean Road, Bournemouth BH7 6PP.

Bulgario: Poŝtkesto 66, Sofia.

Danlando: H.R.Olesen, Engeløvvej 13, DK-2830 Virum.

Francio: 34, rue de Chabrol, Paris 10^e.

D.R.Germanio: Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin.

F.R.Germanio: H.Klünder, Schützenstr. 13, D-443 Burgsteinfurt.

Greklando: Agiu Meletiu 54, (814) Athenai.

Hispanio: Barrencalle Barrena, 7 - 1^a, Bilbao-5.

Hungario: Kenyérmező u.6, Budapest VIII.

Israelo: JELI, Poŝtkesto 4070, Haifa.

Italio: via Po 7, I-10124 Torino.

Japanio: TEJA, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokyo.

Jugoslavio: Amruševa 5/I, 41000 Zagreb.

Kolombio: L.Vargas C. p/a Kolombia E-Ligo, Apartado aéreo 16194, Bogota.

Koreo: I.P.O.Box 1232, Seoul.

Madagaskaro: B.P.3171 Tananarive.

Meksikio: M.Nájera, Apdo. Postal M-9310 Mexico 1, D.F.

Nederlando: N.A.Boersma, Willem Buyslaan 16, Haarlem 1508.

Nov-Zelando: P.O.Box 40-181, Upper Hutt.

Pollando: Jasna 6, Warszawa 1.

Svedio: T.Jansson, Sturegatan 12 B, 2tr., S-75223 Uppsala.

Svislando: N.Margot, Ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne.

Usono: 156 Fifth Avenue, New York, N.Y.10010.

Nealiĝintaj sekcioj

Ĉeĥoslovakio: P.k. 168, Praha 1.

Ĉilio: I.Mättig C. Ejército 180, Santiago.

Norvegio: Boks 942, Oslo 1.

Sovet-Unio: V.Šilas, Dankanto 8-9, Vilnius 9.

La Suno estas for

En aprilo ĉijara mortis Pikaso (Picasso) — la lasta el la grandaj sunoj de la pentrista firmamento. La longe vivinta geniulo ne plu ŝokos la mallonge memorantan mondon, kiu pli ofte parolis pri liaj edzinoj ol pri liaj verkoj, kaj — kiam temis pri tiuj verkoj kaj ilia valoro — oni mezuris ĝin plej ofte en dolaroj.

Unu el tiarangaj geniuloj, kiu kapablis preskaŭ dum unu tuta jarcento ludi per la terĝlobo — petole turnante ĝin ĉirkaŭ sia etfingro. Pikaso estas la plej meritoplena murdinto de la klasika salona arto kaj la plej alta lumturo de la moderna art-mondo.

Sed, ne estas nur lia arto, liaj 16 000 pentraĵoj, 34 000 desegnaĵoj, 300 skulptaĵoj ktp. ktp. tiuj kiuj lumas. Lumas ankaŭ lia vivo, lia ekzilo, persisto kiun li aplikis por reeduki niajn okulojn, kuraĝo per kiu li ĵetis la veron senmaske antaŭ nin.

La mondo perdis la mezurunuon, ne nur pri — kio estas moderna en la arto, sed samtiom — kio estas progresema en la vivo.

2 (Sur la kovrilpaĝoj de ĉi tiu n-ro: memportreto de la artisto kaj lia fabeliĝinta pac-kolombo).

Kanguruo lernas salti

La ĉefministro Gof Ŭitlam (dekstre)
La nova operejo en Sidnejo (sube)

Se oni demandus al ordinara brito, kion li scias pri Aŭstralio, li verŝajne respondus, ke ĝi situas ie antipode, ke ĝi iam estis brita kolonio al kiu oni ekzilis multajn aparte malamindajn krimulojn, kaj, se li estas honesta, ke tiel finiĝas liaj scioj kaj scivolo pri tiu lando.

Certe li malfacile elvokus la nomon de la nuna ĉefministro, Gof Ŭitlam (Gough Whitlam): kaj tamen oni devus iom studi tiun nomon, ĉar li, pli ol ĉiu sia antaŭulo, klopodas malbritigi Aŭstralion.

Sed, tio estas nur unu parto de la politiko de la uraganulo kiu lastatempe konsternis sian landon dum la unuaj kvin



monatoj de la tiea nova Laborista registaro. Jam en la komenco, la nova reĝimo ĉesigis devigan militservon, forte kontraŭstaris la usonan vjetnamian politikon, malfermis diplomatajn rilatojn kun Ĉinio, Norda Vjetnamio kaj GDR, kaj proponis neŭtralan zonan en la sudorienta Azio.

Tiu nova azia orientiĝo montriĝis ankaŭ en la rilatoj kun Britio, en kiuj la forigo de multaj tradiciaj ligoj (nacia himno, proponado por kavaliro, la vortoj "Brita Civitano" sur la pasporto, ktp.) simbolis tute novan pensmanieron.

Same radikalaj estis la ŝanĝoj ĉe la enlanda politiko, kun grandaj novaj programoj por eduko, transportado, sanservo, pensioj, plilarĝigo de la balotrajto, salajro-egaleco por virinoj, ekscedziĝo kaj naskolimigo.

Certe la ĉefministro atentis ne nur al la interna bildo de Aŭstralio sed ankaŭ al la ekstera: li zorgis por forigi tiun odoron je rasismo kiun multaj homoj trovis en la antaŭa politiko. Aŭstralio elpaŝis kontraŭ Sudafriko kaj Rodezio, forigis la malpermeson de enmigro kontraŭ neblankuloj, kaj fine rekonis kelkajn el la rajtoj de la indiĝena popolo.

Tiuj drastaĵoj ne povis ne plaĉi al la junularo: sed al iuj aliaj ili malpli plaĉis. Bili Sneden (Billy Snedden), nova gvidanto de la Liberala Partio, nomis Ŭitlam "nia propra De Gol (de Gaulle)". La ĉefo de la Kamparana Partio deklaris, ke Ŭitlam faros el la lando "sindikate-dominatan maldekstreman respublikon". Laŭ la (dekstrema) Demokrata Labor-Partio, Aŭstralio "forlasas siajn amikojn kaj kunaliancinojn kaj ĉirkaŭbrakas siajn malamikojn". Inter ĵurnalaj komentoj: "La nova viglulo uzas konsternon senbridan kaj sendistingan impeton". "Eble nun niaj federaciaj ministroj ĉesos skui la landon kvazaŭ ian ruĝan pupon." Kaj tamen la lastaj opini-sondadoj atribuas al la ĉefministro rekordan publikan favoron.

Krome tiuj "surprizoj" devus ne surprizi, ĉar preskaŭ ĉiuj troviĝis en unu sama kampanja parolado, kiu, cetere, enhavis 130 specifajn promesojn. Eksterlande, la surprizo estas pli komprenebla, ĉar defore la kampanjaj oratoraj fajraĵoj havas alian perspektivon. Usonon ekzemple ofendis furioza atako de tri aŭstraliaj ministroj dum delikata momento de la vjetnaniaj pactraktadoj, kaj,

alifoje, maldiskretaj ŝercoj de alia ministro kontraŭ la dorna sorto de la dolaro. Usono daŭre flegas la rilatojn, sed sentas Aŭstralion malpli firma kaj fidinda kunaliancano ol antaŭe.

Kun Britio estas malpli da problemoj: Ŝitlam en 1972 nomis la ligojn kun Britio "maksimume sengravaj". Al Londono venis aŭstralia reprezentanto kun la celo en du tagoj malligi la lastajn nodojn kun Britio: la tempo ne sufiĉis, la demandoj restis nesolvitaj, kaj neniu multe sin ĝenas pri la afero.

Dume la lando prosperas, dank'al floraj mina, lana, vianda kaj fabrika industrioj. La senlaboruloj estas nur 1,8%. Ĝenas nur iom da inflacio, sed tio estas monda fenomeno. La vivkostoj estas relative malaltaj, la klimato en la plimulto de la lokoj modera, kaj la laborhoroj mallongaj. Disponeblas sennombraj strandoj, koncertejoj, operejoj, teatroj.

Restas la demando, kiel la aferoj evoluos. Ŝitlam mem antaŭnelonge skizis siajn esperojn en intervjuo. Parolante pri la nova azia orientiĝo de Aŭstralio, li konstatis la grandan diferencon de prospero inter Aŭstralio kaj ĝiaj najbaroj. Konsiderante, ke la suma nacia produktado de Aŭstralio egalas tiujn de Indonezio, Malajzio kaj la tuta Hinduĉinio kune, landoj kun dudekoble de la loĝantaro de Aŭstralio, li opiniis, ke Aŭstralio devus ion kontribui por forigi tiun malekvilibron. En tiu laboro devus partopreni ankaŭ Usono, Kanado, Japanio, EEK kaj la soveta bloko. Tiun problemon oni devus, laŭ li, solvi maksimume en la daŭro de unu generacio.

La alia granda azia temo estas Hinduĉinio. Sen pluaj fremdaj intervenoj en Vjetnamio, tiu regiono havas novan ŝancon. Post la interkonsentoj en Genevo de 1954 oni maltrafis la unuan ŝancon: eble ĉe tiu dua ŝanco, Usono, Sovetio, Japanio kaj Ĉinio ne lasos ĝin eskapi. Li aparte emfazis, ke ne okazu ĉe Tajlando nun kiel okazis al Suda Vjetnamio antaŭe. Pro tio Aŭstralio favoros proponon de zono neŭtrala kaj paca en la sudorienta Azio, kaj instigos al aliaj tieaj landoj doni sian apogon.

Entute la eksteraj rilatoj de Aŭstralio estos pli ĝuste ekonomiaj kaj komercaj ol politikaj kaj militaraj. Ĝi serĉos, diris Ŝitlam, sendependan vojon, cele al nova siaregiona komunumo kiu liberigu la regionon de la rivalecoj inter la grandpotencaj landoj.

Rilatoj kun du aliaj landoj elstaras kiel aparte gravaj. Unue, tiu kun Usono. Ŝitlam daŭre kontraŭis la Usonian enmiksiĝon en la Vjetnamian militon, kaj la pribombadon al Norda Vjetnamio, kaj volis uzi la influon de Aŭstralio kontribue al haltigo de la milito. Tamen, li bone komprenis la valoron de la alianco kun Usono. En la postmilitaj jaroj la interdependo kaj interkompreno kun Usono estis pli forta ol ĉiam antaŭe: sed interdependo postulas egalecon.

Laŭ la graveco due venas la rilatoj kun Ĉinio. Laŭ Ŝitlam, Usono, kaj kun ĝi Aŭstralio, faris grandan eraron post la Ĉina Revolucio, kredante ke la nova reĝimo estos agresema kaj danĝera. Tiel ne estis: Ĉinio ne estas, kaj dum longe ne estos, danĝera komerca rivalulo, kaj en politika rilato tiu lando restas trankvila ene de siaj landlimoj.

Ankaŭ la enlandan politikon li tuŝis. La ĉefa problemo tiurilate estas ekonomia, nome la kreskanta enpenetro de eksterlanda kapitalo en la aŭstralian ekonomion, fare de alilandaj aŭ plurilandaj kompanioj. Ekzistas la danĝero, ke tutaj industrioj estos de eksterne posedataj, do ekster



Aŭstraliaj indiĝenoj: La registaro de Gof Ŝitlam promesas solvon ankaŭ de la problemaro de la aŭstraliaj praloĝantoj.

la rego de Aŭstralio mem. La registaro certe ne forturnos tiun eksteran kapitalon; ĝi simple faros kelkajn raciajn kaj moderajn regulojn, kaj ĝi esperas, ke la eksterlandaj kompanioj donos laŭrajtan proporciojn de la gvidaj postenoj al aŭstralianoj.

Tiel diris la ĉefministro. Restas la demando, ĉu tiel okazos. Oni diras, ke, eĉ se liaj ideoj estas pravaj, kio mem ne estas nepre certa, li emas al malpacienco, kaj povus tro rapide trudi ilin en la praktikon. Estas la risko, ke li povus malsimpatigi tro da influaj rondoj samtempe. Ŝitlam bezonas la kunlaboron de la sindikatoj, kaj en ĉiuj landoj la sindikatoj estas pli ĝenaj por "amika" laborista registaro ol por "malamika" konservativa. Kelkaj el la sindikatoj jam avertis, ke li ne apliku salajrolimigojn kontraŭ inflacio, kvankam li malfacile kontraŭos inflacion per nuraj prezolimigoj. La komerco kaj industrio, kiuj neniam fidis la laboristan partion, ĝis nun modere reagis, sed tamen maltrankvilas pri kreskanta registara interveno ĉe prezoj, ĉe salajroj, kaj ankaŭ ĉe eksportoj kaj deeksteraj investoj. Konsternis la vortoj de la financministro: "Venas al mi eksterlandaj bankistoj pogrege, kun demandoj pri estontaj investoj en Aŭstralio. Mi diras al ili: Mi ne volas vian monon, iru kun ĝi al Indonezio."

Alia malhelpo por Ŝitlam estas la ministraro, elektita ne de li, sed de la laboristaj parlamentanoj. Ili estas ĉefparte amataj partiaj malnovuloj, sen aparta brilo. Krome okazis kelkaj maldiskretaĵoj diraj kaj faraj.

Ĝenerale, la aŭstralianoj certe povas esti kontentaj pri sia lando, sed, laŭ iuj, pli pro bonŝanco ol pro bona organizo. Iuj suspektas, ke ia troa materialismo malebligis krei vivon eĉ pli bonan, jen por Aŭstralio, jen por aliaj landoj. Pri tio kulpas nek la tuta lando nek la tuta popolo. Oni kulpigas tiujn industriistojn kaj sindikatestrojn, kiuj ne sukcesis larĝigi la horizontojn de ĝiaj aspiroj. Ŝajnas, almenaŭ laŭ la farita komenco, ke Gof Ŝitlam faros sian eblon por tion ŝanĝi.

Ĝefri King

Per ovoĵ kaj tomatoĵ kontraŭ dulingveco

LA DISPUTO PRI LA RAJTOJ DE LA SLOVENA MINORITATO EN AŬSTRIO

La sceneĵo estas Karintio, la suda limlando de Aŭstrio. Dum unu nokto en pasinta aŭtuno eksplodis tie emocioj, kiuj al kelkaj observantoj ŝajnis aŭguri novan internacian batalon en Eŭropo, kompareblan kun la celadoj de vaskoj kaj bretonoj aŭ eĉ kun la sangaj tumultoj en norda Irlando.

En Karintio vivas slava minoritato, iom post iom ŝrumpanta: slovenoj, kies pli granda parto posedas aŭtonoman ŝtaton, la Socialistan Respublikon Slovenion, en la norda parto de la najbara Jugoslavio. Esence temas pri la demando, ĉu al la slovenoj en Karintio estos garantiitaj en la praktiko tiuj minoritataj rajtoj, kiujn ili ricevis per leĝo kaj interkonsento.

Fine de septembro, subite ekflamis en la kvietanta montara regiono naciismaj pasioj. Meznokte junuloj, ebrigitaj per vino, perforte forigis aŭ detruis la dulingvajn lokindikilojn, kiuj ĵus estis instalitaj laŭ instrukcio de la aŭtoritatoj. La "tabula milito", unue primokata kiel kruda ŝerco aŭ iom neordinara formo de alpolanda folkloro, plilarĝiĝis al politika skandalo, ĵetado de ovoĵ kaj tomatoĵ kontraŭ la socialista landestro de Karintio, demonstracioj en Jugoslavio kontraŭ la "rasisma teroro" kaj la "pogromoj" de aŭstria "faŝisto" kaj al drasta malboniĝo de la longtempe bonegaj rilatoj inter Aŭstrio kaj Jugoslavio.

Jen inkubo, jen timo

La slovenoj en Karintio apartenas al la plej malgrandaj el la entute pli ol 70 naciaj minoritatoj en Eŭropo, estante ĝis nun ankaŭ ĉiam unu el la plej pacemaj. Devenante de la slavaj "karantanoj", kiuj ekloĝis en la regiono antaŭ pli ol 1300 jaroj, ili estas heredaĵo de la multnacia monarkio de Aŭstrio-Hungario kaj nun diŝe vivas inter la lagoj ambaŭflanke de la rivero Dravo. La plej multnombra grupo en la minoritato konsistas el homoj grandparte asimiliĝintaj, kiuj parolas la vindan dialekton, miksaĵon de germanaj kaj slovenaj vortoj. Estis ili, kiuj savis la teritorion unuecon de Karintio, voĉdonante en oktobro 1920 por Aŭstrio – sekve, kontraŭ la aliĝo de suda Karintio al Jugoslavio. La pli malgranda grupo de naciecaj slovenoj, aliflanke rigardas translimen – al Ljubljana, la ĉefurbo kaj kultura centro de Slovenio.

La minoritato daŭre malkreskas. En 1910, 66 463 karintianoj, preskaŭ 20% de la tuta loĝantaro, sin deklaris slovoj. En la popolnombrado de 1961, el la 111 000 sudkarintianoj nur 8 259, t.e. 7,4%, indikis la slovenan kiel solan ĉiutagan lingvon. Pliaj 5 744 personoj nomis la slovenan kiel ĉiutagan lingvon en kombino kun la germana aŭ la vinda dialekto.

Ne mirige, ke la aŭstriaĵn slovenojn premas inkubo pri baldaŭa formortado. Por almenaŭ laŭvide prezenti koheran teritorion, ili postulas dulingvajn indikilojn en ĉ. 900 lokoj. Dume, la germanlingvaj karintianoj plagas la timiga memoro pri du anekso-klopodoj de la jugoslaviaj najbaroj. En 1918 kaj 1944/45 armeanoj kaj partizanoj invadis el Jugoslavio la landon, kaj nur en 1955, partoprenante la subskribon de la traktato pri sendependeco kaj neŭtraleco de Aŭstrio, Jugoslavio laŭjure agnoskis la aŭstriaĵn limojn de 1938.

Aŭstrio siaflanke zorgis, ke en la lernejoj la slovena lingvo estas instruata (eĉ se troviĝas nur unu lernanto). Pastroj predikas kaj advokatoj pledas slovene. La minoritato nun posedas propran gimnazion kun 421 lernantoj, du semajngazetojn, aron da organizaĵoj kaj kooperativan asocion kun 31 ŝparkasoj. Radio Klagenfurt disaŭdigas ĉiutage unu horon en la slovena.

Unu leĝo kaj la sekvoj

Sed neniam la aŭstroj starigis la dulingvajn lokindikilojn en komunumoj kun konsiderinda nombro da slovenoj, kio estas jure ilia devo laŭ la traktato, nek decidis leĝon pri rekono de la slovena kiel dua oficiala lingvo. Registrado de la nombro de slovenoj aŭ referendumo, tamen, surbaze de kio oni konstatus, kie necesas la "tipografiaj surskriboj", ne okazis pro la absoluta opozicio de la slovenoj mem, ĉar iliaj gvidantoj timas, ke tia nombrado pruvos nereala ilian pretendon havi mandaton de 80 000 aŭ eĉ 120 000 slovenoj kaj krule dokumentos la sekvojn de la asimiliĝa procezo.



Demonstracioj en Klagenfurt: Furiozo kun lingvo-radikoj



Simboloj de lingvo-egaleco montriĝis ĝenaj.

Ne signoj de slovena maltrankvilo en Karintio, sed la ŝovinismaj eventoj interne de Jugoslavio instigis la vianan registaron subite ekatiki la longe neglektitan problemon – antaŭ ol la jugoslaviaj okazaĵoj influus la sentojn de la slovenoj en Aŭstrio. En julio 1972 la Socialista Partio rapidege akceptigis en la parlamento leĝon pri la starigo de lokindikiloj en la germana kaj slovena lingvoj, kaj baldaŭ ili ornamis ĉiujn lokojn, entute 205, kie laŭsupoze vivas almenaŭ 20 % de slovenoj.

La bonintenca decido havis fatalajn sekvojn. Farita sen interkonsiliĝo kun la ceteraj partioj kaj sen sufiĉa psikologia preparo, ĝi ĝisoste ŝokis la germanec-konsciajn karintianojn. Kun la furiozado de kelkaj ebruloj, kiujn apenaŭ provis bridi la lokaj ĝendarmoj, simpatias dekmiloj, por kiuj la indikiloj tute senbaze signalis novan aneksemon de Jugoslavio kaj la pereon de sia "karintia patrujo". Flugfolioj kaj kantoĥoroj proklamis "Karintio devas resti germana"; sur muroj aperis sloganoj "Morton al la slovenoj"; kaj politikistoj respondecaj pri la decido ricevis murdo-minacojn.

Samtempe la slovenoj en Jugoslavio esprimis per protestaj demonstracioj sian solidarecon kun la "subpremataj fratoj" en Karintio – kio ne estas malpli supraĵa prijuĝo ol la reagoj de la german-aŭstriaĵ ekstremuloj. La registaro en Beograd minacis, ke Jugoslavio surtabligos, "pro la malkapablo de la aŭstriaĵ aŭtoritatoj", la minoritatan problemon en internacia konferenco kaj kulpigos Aŭstrion pro neplenumo de traktataj devoj. Dume, eĉ tiuj aŭstroj, kies konsterniĝo pro la eksceso de siaj plebaj samlandanoj estis sincera, ne kaŝis sian suspekton, ke Jugoslavio mobilizas indignon kontraŭ Aŭstrio ankaŭ por deturni la atenton de siaj propraj internaj problemoj.

Kiel trovi eliron

Efektive, la fortaj atakoj el Jugoslavio preteratentis la bonan volon de la aŭtoritatoj en Vieno. Deklaro de la

aŭstria Ministerio de Eksterlandaj Aferoj konfirmis en januaro 1973, ke la slovenoj en Karintio "bezonas, por kultura, etna kaj ekonomia evoluo kaj por ebligado de nelimigita partopreno en la socia evoluo de la majoritata popolo, flanke de la registraro apartan politikan subtenon, kiu eĉ transiras la kadron de la egalrajteco de la civitanoj". Intertempe Tito klopodis mildigi la atmosferon, esprimante sian interesiĝon pri plua bonnajbareco kun Aŭstrio.

Kanceliero Krajski (Kreisky) per serio da konferencoj, i.a. kun vilaĝestroj el la regiono, provis trovi eliron el la dilemo: ĉu perforte starigi la indikilojn aŭ simple prokrasti kaj atendi. Fine, li konkludis, ke la leĝo nuntempe ne estas realigebla – bela kapitulaco de la ŝtata aŭtoritato antaŭ leĝrompantoj.

Komisiono estis establita por ellabori novajn proponojn. Pri unu punkto, efektive la kerno de la nuna konflikto, Krajski deklaris sin nekompromisema: Li forte rifuzis bazi la aranĝon de dulingvaj indikiloj sur oficialan konstaton pri la laŭnombra forto de la minoritato.

Dume, sur la kulmino de la disputo pri la rajtoj de la slovena malplimulto en Aŭstrio, al *Viner Cajtung*, la oficiala organo de la registaro, restis nur eta konsolo. Pri traktante la krizan situacion, ĝi registris ankaŭ unu pozitivan eventon, nome ke en la maltrankvila aŭtuno de 1972 tute alispeca minoritato demonstris pacan kunekzistadon. Temis pri aŭstroj, jugoslavo kaj italoj, kiuj interbabilis ĝuste en Klagenfurt, la ĉefurbo de Karintio, – en la kadro de amiketosa Trilanda Esperanto-Renkontiĝo.

U. Lins



La apliko de la leĝo pri dulingvaj lokindikiloj en Karintio montriĝis aventuro: La lingva egaleco estos "prokrastita".

ELOKVENTE PRI GENOCIDO

En la pasinta jaro verŝajne pli ol 150 000 homoj mortis en la centro de Afriko: En Burundio, lando kun 3 milionoj da loĝantoj, la reganta tribo de tusioj defendis siajn potencon kaj privilegiojn, brute mortigante virojn, virinojn kaj infanojn de la sesoble pli multnombra tribo de hutuoj. Papo Paŭlo parolis pri "organizita buĉado de senkulpaj homoj", kies fono estas, laŭ kompetentaj observantoj, la persista strebado de la tusioj gardi sian de jarcentoj praktikatan feŭdisman ekspluaton de la nacia plimulto ankaŭ trans la finon de la koloniisma epoko. Kiam la hutuoj ekribelis kontraŭ siaj subpremantoj, la tusioj ekpaŝis al fina solvo per amasmortigado, precipe de viroj kaj inteligentuloj (kiaj oni juĝis ĉiujn, kiuj scias legi kaj skribi). Dekmiloj fuĝis al la najbaraj landoj.

La afrikaj ŝtatoj decidis ignori la genocidon kiel "internan aferon de Burundio". Nek Unuiĝintaj Nacioj demonstris grandan emon kontraŭigi aŭ eĉ nur trakti tiun ĉi plej teruran afrikan masakron depost la okazaĵoj en Kongo. Pro la nesufiĉa scio, kiu regas en la monda publiko pri tiu tragedio en la koro de Afriko, estis salutinda iniciato, ke la sveda "Inter-Agadgrupo por Esperanto" kaj dana prelegvojaĝa servo invitis Jisten (Justin) Minani, burundian studenton en Francio, fari paroladojn en pluraj urboj de Skandinavio. Kiel ni legas en la dana Esperanto-revuo *Eŝo*, Minani, mem apartenante al la persekutata tribo de hutuoj, ne povas reveni al sia hejmlando.

Jen okazo por ricevi senperan priskribon de la apenaŭ konataj cirkonstancoj en Burundio, kaj efektive la temo de la prelegoj estis, laŭ raporto de "Inter-grupo" en *Heraldo*, "Burundio - lando, en kiu okazas genocido, kiam dormas la monda konscienco". Minani prelegis Esperante, i.a. en gimnazioj, popolaj altlernejoj, universitato, kaj laŭbezone estis provizita interpretado nacilingven.

Grandan miron, tamen, devas elvoki la supraĵa, ekstreme nelerta maniero, per kiu raportas *Heraldo* kaj ankaŭ *Eŝo* pri la prelegvojaĝo de la studento. Ni rajte atendus koncizan resumon de la enhavo de liaj prelegoj pri la prisilentata murdkampanjo, por ke eble ni povu helpi, eĉ se modeste, vekti la mondon el ĝia indiferenteco.

Anstataŭe, oni larĝe distretas en *Heraldo* la fakton, nepre duarangan en ligo kun tia temo, ke Minani parolis Esperanton per "rapida fluo". Ni ekscias, ke la aŭskultantoj "esprimis sian admiron pri la internacia lingvo" kaj ke ili "plene" konvinkigis "pri la ekzisto de altkvalita interlingvo".

Kial oni al ni prezentas tiajn banalaĵojn? Pro kio necesas laŭdi por legantoj de *Heraldo*, ordinaraj esperantistoj, la konatajn avantaĝojn de Esperanto? Ĉu ne estas io



raportinda pri la enhavo de la prelegoj, pri la prezentitaj faktoj? Kiel reagis la publiko? Oni mencias, ke okazis postprelegaj demandoj kaj respondoj, sed tuj revenas al informo, ŝajne por la nur-esperantistoj pli mondskua: "Post ĉiu prelego multaj petis detalajn informojn pri Esperanto".

Ĉu tio estis ĉefa zorgo aŭ sole menciinda reago de la publiko, ni forte pridubas, memorante la kuraĝajn protestojn, per kiuj ĝuste la svedoj sin aŭdigis dum la furioza milito en Hindoĉinio. Ke ankaŭ "Inter-grupo" sentas ian kontenton pro tio, ke dank'al ĝia iniciato pluraj ĵurnaloj intervjuis la studenton el la malfeliĉa Burundio, ni volonte emas kredi, sed ĝia posteventa raportado neeviteble postlas impreson, ke unuavice gravis la efiko por "nia movado" — ke Minani helpis prepari la terenon por estontaj prelegoj, eble kun pli plaĉa enhavo: "Kompreneble, la prezentado de aktuala temo kaj elokventa stilo de la prelegisto lige al senproĉa interpretado grave influas, garantiante tre facilan reaperon de novaj prelegistoj de tempo al tempo."

Estis tempo, kiam esperantistoj sentis internan reziston utiligi la lingvon por io, kio ne konformis la idilian etoson dominantan en iliaj kluboj. Intertempe, kiam eĉ lernejoj konscias pri mondo plena de tensioj, konfliktoj kaj diskriminacioj, oni vidas sin ĉiam pli pelata alpreni almenaŭ nebulan pozicion pri la plej okulfrapaj problemoj de la nuntempo, aŭ simple klopodas internaciigi la idilion, ekz. per Semajnoj de Internacia Amikeco. En ambaŭ okazoj plue manifestiĝas la tradicia inklino al vivado ekster realaĵoj, al enhav-malriĉo, al eksterproportia gravigo de la rolo de Esperanto.

Ĝoje notante, ke burundiano, laŭ la formulo de *Eŝo*, "povas rakonti interesajn aferojn el la moderna kaj kruela evoluo en Afriko", tiuj esperantistoj trovas plezuron inceste gratuli sin mem, kiel elokvente, belsone, facilkompreneble oni parolas en Esperanto — eĉ pri genocido.

U.L.





LA DUA BATALO POR VUNDITA GENUO

La ribelantaj indianoj, kiuj okupis la setlejon Vundita Genuo en Suda Dakoto, disponas delikatan senton por la simbola gesto. La nomo de la loko, en kiu nun vivas 40 loĝantoj, ŝarĝas kiel hontiga memorigo la usonan konsciencon. Vundita Genuo – diris iu bona konanto – “estis pli terura ol Mi Laj, ĉar la vero estis tiel longe kaŝita”. La loko indikas, laŭ la lernolibra jargono, la lastan batalon de la indianaj militoj, la sigelon sur la “pacigon” de la usona okcidento. En la lingvo de la indianoj, tamen, Vundita Genuo ĉiam ricevas la epiteton “masakro”: ĉi tie 300 siuks-indianoj, ĉefe virinoj kaj infanoj, ĉiuj kaptitaj kaj nearmitaj, estis en vintro 1890 mortpafitaj de kavaliraj soldatoj. La vunditojn oni lasis ĝismorte frosti en neĝo. Estis la brutala fina punkto post kvar jarcentoj de kontraŭbatalado kaj ekstermado de la indiana nacio.

Facile kompreneblas la simbola karaktero de la okupado ĝuste de tiu loko far 200 plejparte junaj siuksoj. La okupintoj venas de ekster la rezervejo, al kiu apartenas Vundita Genuo. Ilia gvidanto Rasel Mins (Russel Means) vivas en Klevelando. Sed kion ili volas atingi, restas, krom retoriko, malklara. La grupo kalkulas sin al Amerika Indiana Movado (AIM), organizaĵo de militemaj indianoj, kiuj de kelkaj jaroj elvokis atenton per similaj okupadoj. En 1969 ili okupis la neloĝatan prizonan insulon Alcatraz (Alcatraz) en la golfo de Sanfrancisko. En pasinta novembro ili setlis por unu semajno en la Oficejo por Indianaj Aferoj, filio de la Ministerio pri Internaj Aferoj en Vaŝingtono; ili detruis meblojn kaj ŝtelis dokumentojn, sen esence servi per tio al la afero de la indianoj. Similaj perfortaĵoj flanke de militemaj indianoj okazis ankaŭ aliloke.

Tiaj gestoj evidente celas unuavice direktigi la atenton de la nacio al ĝia plej malriĉa kaj longtempe plej pasiva malplimulto. Krom negroj, virinoj kaj meksikanoj, ekde la fino de la sesdekaj jaroj ankaŭ la indianoj trovis sian militeman, celantan al politika potencpreno, reprezentaron. “Ruĝa Potenco”, la pretendo de la ruĝaŭtaj praamerikanoj, estas la lasta krio en la koncerto de ribelemaj minoritatoj.

RIFUZO DE LA INTEGRIĜO

Ĝi estas samtempe la batalkrio, kiu plej facile tuŝas la usonan konsciencon. De aliaj ĝi diferenciĝas per tio, ke ĝi

ne postulas plenan integriĝon en la blankulan mondon, sed la revenon al la propra tradicio, al kulturo, kiu obstine transvivis la fizikan eliminon de la indiana “nacio”. “Ruĝa Potenco” postulas la aŭtonomion de la triba strukturo. Troviĝi en la interno de la triba universo, notis inteligenta parolanto de la nova movado, “estas tiel racia kaj komforta, ke ĝi efikas kvazaŭ narkotaĵo. Kiam oni estas elpelita el la tribo, oni iĝas senhelpa, fremdiĝinta, soleca. Plena de senespero oni resopiras al la tribo, se nur por ne perdi la mensan ekvilibron.”

Tra pluraj jardekoj estis oficiala politiko de Vaŝingtono integri la venkitajn indianojn en la supozatan fandujon Usono. La “dependa nacio” en la interno, kun kiu la registaro faris ekde 1778 kontraktojn (ĉiuj estis rompitaĵoj), tiu ĉi amalgamo el ĉ. 300 triboj, estis usoniĝonta ekde la fino de la jarcento. La Oficejo por Indianaj Aferoj, unue ligita al la Milit-Ministerio, poste al tiu pri Internaj Aferoj, iĝis la patreca kuratoro de la indianoj.

POR ĈIU INDIANA FAMILIO – UNU BUROKRATO

La pasintjara okupo de la Oficejo por Indianaj Aferoj en Vaŝingtono helpis al la ĝenerala publiko percepti almenaŭ parton de la sistemo reganta la destinon kaj vivon de la



“ruĝa homo”. Fondita jam en la jaro 1834, la Oficejo iom-post-iome akiris preskaŭ absolutan regon super ĉiuj vivaspektoj en la indianaj rezervejoj. Kun 16000 oficistoj en siaj filioj tra Usono, la Oficejo fariĝis – kiel diras antropologo Robert Tomas – “la plej kompleta kolonia sistemo en la mondo”.



Oldaj siuksoj de Vundita Genuo en la jaro 1890.

La plej granda parto de la rimedoj destinitaj por la indianoj efektive estas uzata por vivteni ĉi tiun mamutan burokratan organizon: oni kalkulis, ke ekz. en la granda rezervejo Pajn Riĝ de kie venas ankaŭ siuksoj el Vundita Genuo por ĉiu indiana familio jare estas elspezata sumo de 8040 dolaroj, sed el tio la familio ricevas nur 1900 dolarojn; la resto estas "kostoj" de la administrado – ĉar, je ĉiu familio venas po unu burokrato. Lia povo rilate al siaj "protektitoj", kiujn li traktas kvazaŭ infanojn, ŝajnas esti tute senlima. La Oficejo "zorgas" pri ilia mono kaj donas ĝin nur kiam "la postulo estas pravigebla"; la Oficejo decidas ankaŭ pri la destino de la kutivebla grundo kiu apartenas al la indianoj, samkiel pri la ekspluatado de la naturaj riĉaĵoj; ĝi translokigas la indianojn el la rezervejoj en urbajn getojn; ĝi edukas indianajn infanojn. Fine, la Oficejo administras la indianojn ankaŭ post ilia morto – decidante ĉu ilia testamento estas jure valida aŭ ne.

La triboj en rezervejoj. Iliaj teritorioj ampleksis manplenen da vilaĝoj aŭ, ekzemple ĉe la navaĥoj, la plej granda tribo, terenon, kiu etendiĝas tra tri ŝtatoj en la sudokcidento. Ilia administrado ne estas submetita al la jurisdikcio de la ŝtatoj, en kiuj ili troviĝas, sed al la Federacia Registaro en Vaŝingtono. Iliaj enloĝantoj kaj tero estas senimpostaj. La triba reprezentejo estas "konsilantaro", kies membroj elektas prezidanton.

Tiun prezidanton asistas "superintendento", sendita de la Vaŝingtona Oficejo. Li kaj liaj kunlaborantoj zorgas pri

la ligoj kun la ekstera mondo, tamen onidire ne havante ekzekutivajn rajtojn. "Ni estas tie ĉi gastoj de la papagooj", deklaris unu superintendente en rezervejo en Arizono.

Lia vorto estas nek instrukcio nek ordono; en unu papagoo vilaĝo la bovoj malsatmortis, ĉar la indianoj malfidis la konsilojn el Vaŝingtono pri nutrado. "La papagooj", klarigas la funkciulo, "troviĝas ĵus en frua stadio de la transiro al la moderna epoko."

TUBERKULOZO ANKORAŬ FURIOZAS

Por la pli junaj indianoj, nome la migrintoj al la urboj, tiaj rimarkoj havas fatale paternalisman tonon. Ekster la rezervejo kreskas la militemo, precipe en la universitatoj. La procentaĵo de analfabetoj inter la indianoj estas timige alta, sed la lernemuloj, al kiuj stipendioj ebligas universitatan studadon, revenas kun ribelemaj ideoj. Estas unuavice ili, kiuj informas la nacion pri la teruraj kondiĉoj de la indianoj. La "ruĝhaŭtuloj" ne nur estas la plej malriĉaj en la lando, kun kvardekprocenta senlaboreco, ili ankaŭ havas la plej grandan nombron de infanmortoj, la plej mallongan vivdaŭron, la plej aĉajn loĝcirkonstancojn. Multaj rezervejoj estas subĉielaj mizerkvartaloj. Tuberkulozo, preskaŭ malaperinta en Usono, ankoraŭ furiozas inter indianoj.

La senĉesa malmultiĝo de la indianoj cedis en la lastaj du jardekoj al loĝantara eksplodo; de 1950 ilia nombro preskaŭ duobliĝis. La lasta popolnombrado de 1970 notas 792 000 indianojn en Usono, el kiuj ĉ. 500 000 vivas en rezervejoj. La radikalaj pledantoj de "Ruĝa Potenco" loĝas kutime en urboj. Iliaj postuloj ofte celas plibonigon ĝuste de tiu grupo, kiu sentas sin malprivilegiita kompare kun la rezervejanoj. Ili scias, ke ne ĉiu povas reveni en la sekuran triban organizon, kvankam multaj tion faras. Laŭ la statistiko de la Indiana Oficejo, tri el dek indianoj, formigrintaj al urboj, retrovas sian vojon al la rezervejo, antaŭ ol pasis unu jaro.

La junaj militemuloj postulas por la urbaj indianoj la samajn servojn, kiujn disponigas la aŭtoritatoj en la rezervejoj – higienan prizorgon, stipendiojn, metilernejojn. Antaŭ ĉio ili celas fundamentan reformon de la Oficejo por Indianaj Aferoj, flarante tie ĉiam tromemfidon, troan reedukan fervoron. Ili estas bruligitaj infanoj, tro longe konformigitaj de misiistoj, ŝtataj kaj ekleziaj, al iliaj imagoj. Ili sopiras al memrespekto, kiu inkluzivas erarojn, sed postulas propran respondecon.

Ne ĉiuj indianoj strebas al tiom da libereco. Inter indianoj en rezervejoj kaj urboj kelkfoje regas suspektemo, kaj dum la okupado de Vundita Genuo ankaŭ tribinternaj konfliktoj kunludis rolon. La junaj ribelantoj nomas la triban estraron lakeoj de la vaŝingtonaj burokratoj kaj vokas al novelektoj. La siuksaj ĉefoj, kontraŭe, parolas malestime pri "deviantoj", kiuj incitas pacan popolon. Ĉiuj ĉi argumentoj kaj kontraŭecoj estas konataj de la agitado de negroj kaj aliaj minoritatoj. Ankaŭ la taktiko estas la sama, kiel ĉie identas la retoriko. Sed la plendoj havas pravon, kaj la militemaj gestoj atingas sian celon, kiam ili direktas la lumon for de demonstracioj al la malbonaĵoj.

La amarecon de la okupintoj de la insulo Alkatras, de la Vaŝingtona Oficejo kaj de Vundita Genuo malgrandigas la fakto, ke indianoj prezentas pli ol 50% de la dungitoj de la ĉionpova Oficejo. Por la batalemaj siuksoj ili estas "pomoj" – ekstere ruĝaj, kaj blankaj interne.

Inter idilio kaj realo

En Hinda Unio produktiĝas pli da filmoj ol en kiu ajn alia lando de la mondo. Ĉiujare ĉ. 400 filmoj eliras el hindaj studioj — ĉiujare oni vendas ĉ. 600 milionojn da enirbiletoj por kinejoj. La plimulto de la vizitantoj estas gejunuloj inter 18 kaj 30 jaroj, ekipitaj per tre malalta salajro kaj nesufiĉa edukiteco. Ili, same kiel hindaj filmspektantoj ĝenerale, pacience rigardadas dum tri aŭ eĉ pli da horoj: la kutima daŭro de filmo.

Ĉar la filmoj sekvas la junularan guston, ilia kreskanta kvanto ne estis akompanata de pli da kvalito. Fakte, la hodiaŭaj filmoj de Hinda Unio memorigas pri la plej malbonaj tempoj de Holivud. La enhavo preskaŭ ĉiam samas, kaj preskaŭ ĉiam la bono triumfas super la malbono. La akcesoraĵoj de sukcesa filmo estas antaŭdeciditaj: oni bezonas vaste konatajn aktorojn (la plej popularaj ricevas leterojn skribitajn per knabina sango kaj vivas kvazaŭ maharaĝoj); situaciojn, tiel facile kompreneblajn kiel la venonta sunleviĝo; temojn, kiuj estas malproksimaj tiom de nuntempo kiom de pasinteco; sekse ŝarĝitajn kantojn kaj incitajn dancojn; bombastan interparoladon. La rezulto estas melodrama koktelo el sekso, krimo kaj idealismo.

La hinda filmo perdis sian originan, hindan stilon de la 20'aj kaj 30'aj jaroj, ne gajninte novan, internacie interesan karakteron. Ĝi kutime estas banala. Tamen, ĉar la plej multaj filmoj estas hindi-lingvaj, la filmindustrio almenaŭ kontribuis al popularigo de la ŝtata lingvo en regionoj dominataj de aliaj lingvoj.

La intelekta kaj estetika malriĉo de tiu amasvaro ne malgrandigis la gajnon. Ankaŭ en Hinda Unio, se filmo

iĝu finance profita, devas aldoniĝi konsiderinda porcio da sekso. La cenzuro estas severa; nudaj virinoj ne rajtas aperi, kaj eĉ pri montrado de kisoj levigis forta disputo. Sed la reĝisoroj scias lerte ĉirkaŭiri la limigajn leĝojn. La ĉeffaktoroj ofte ludas seks-obseditan idioton, kiu en plej neimageblaj lokoj ĉasas tro ŝminkitan junulinon. Eĉ en la ŝatatajn mitologiajn filmojn penetras seksaj scenoj, ĉar hinduaj dioj kaj diinoj povas permesi al si multon, kio al hindaj homoj estas malpermesita.

En la lastaj jaroj, tamen, apud tiu komerca filmo establiĝis "nova ondo" de junaj reĝisoroj, kiuj klopodas sekvi la tradicion de Ŝotoĝit Roj, la sola arte serioza filmpioniro de Hindio. Ilia laboro ankoraŭ restas neniel signifa el financa vidpunkto, sed kelkaj el la ĉ. 40 novondaj filmoj jam estis sukcese prezentitaj dum film-semajnoj en eksterlando.

Dum en la establita filmo de la iluzioj ekzistas nek malpuro nek malriĉo, forestis korupto kaj subpremo: do, regis eskapismo de mirinda perfekteco — la novaj filmoj estas provokaj per emociplena prezentado de homaj konfliktoj antaŭ la fono de socia realeco.

La "Nova Film-Movado" ĝuas ŝtatan protekton. La Ŝtata Filma Financa Korporacio subvencias tiun novan tipon de filmo. Tio indikas kaj la eblojn kaj la limojn de la nova hinda filmo. La ebloj konsistas en la kompreno de la registaro, ke la gigantaj malfacilaĵoj de la subkontinento necesigas multe pli evoluintan politikan konscion de la civitanoj. En tiu kunteksto, la filmo estus eduka instrumento, kio havus centran gravecon precipe pro tio, ke la konstitucio, ekzemple, proklamas multon





belan pri la egalrajteco de homoj, dum efektive la kasta sistemo kun ĉiuj siaj diskriminaciaj trajtoj ankoraŭ estas forte enradikiĝinta en la ĝenerala konscio. Sekve, ne estas mirige, ke tra preskaŭ ĉiuj filmoj tiriĝas kritiko kontraŭ la malnova kasta sistemo. Plej severe ĝin kritikas la filmo "Du fratoj" de Patabhi Redi kaj Mrinal Sen, kiu akcentas la ideologian funkcion de la kasta sistemo, nome la konscian kaŝadon de sociaj kaj ekonomiaj privilegioj per la sinturnado al tradicio kaj religio. La reĝisoro Redi montras en "Entombigaj ritoj" bramanojn de tri specoj. La unua kvazaŭ solece sekularigis la religian heredaĵon, konsekvence kaj malkaŝe malobservante la leĝojn de sia kasto. La plimulto de la ceteraj membroj de la bramana kasto en la vilaĝo estas monavidaj hipokrituloj, kiuj al aliaj trudas leĝojn, kiujn ili mem ne observas. En konflikto troviĝas nur la vilaĝestro, kiu ŝanceliĝas inter tradicio kaj racio, integra figuro, kiu ne povas kliniĝi al la rigida norma sistemo. La streĉiteco inter tradicio kaj nuntempo forte evidentiĝas en multaj filmoj. En "Du fratoj", ekzemple, tiu konflikto estas personigita: La pli aĝa frato insistas pri la tradicio postulanta nedivideblon de terposedaĵo, la pli juna deziras vendi sian parton al profitema bramano. Fine la pliaĝulo forlasas la bienon pro la nedivideblo. Fatalisma tendenco ne estas observebla nur en la agado de tiu persono.

La signifo de la juna hinda filmo sendube konsistas en tio, ke ĝi peradas informojn pri malbonoj kaj ke ĝi per sia metodo, orientita al emocia partopreno, provokastiajn sentojn kiel kompaton. Kompreneble estas longa vojo de tie al kompreno pri la neceso de ŝanĝo kaj, fine, al propra aktivado. Eble nur "Kalikato 71" de Mrinal Sen atentigas pri tio. Ankaŭ lian filmon oni ne povas en tiu senco nomi

revolucia, kiel la revoluciajn filmojn el Latina Ameriko, kio estas facile komprenebla pro tute alia situacio en Hindio, kies demokratio, malgraŭ gravaj mankoj, ankoraŭ funkcias. Sed la filmo de Sen estas agresema, kolera, akra, ne sinĝene detenema. Aliflanke, ĝi envolas fortan kritikon en tiom da sentimentaleco kaj folkloro, ke la rezulto estas pli-malpli nula.

"Kalikato 71" montras fizikan mizeron kaj morton. En ĝi, junulo tramigras la modernan hindan historion, konkludante: "Nia historio, mi tion vidas, estas historio de senĉesa malriĉo, kaj tio daŭras jam de pli ol mil jaroj." Ĝia temo estas la socia stagnado, sed ĝi kontrastigas ĝin kun la psiko de siaj figuroj, komenciĝas rezignacie kaj finiĝos kolere. La bildoj ne plu havas tiun paŝtistan idilion, kiu ankoraŭ troviĝas en la aliaj filmoj malgraŭ konsiderinda fideleco al la ĉirkaŭaĵo. Tio kompreneble estas ankaŭ ligita kun la scenejo de la filmo, la urbo Kalikato, nomata foje "antaŭhalo de la infero", en kies mizerkvartaloj fakto kaj ŝajno nedistingeble kunekzistas. Ĝi estas atentinda filmo; ke ĝi trapasis la cenzuron, estas esperige, kvankam prezentadon en la tuta lando grandparte malhelpas la hinda kineja strukturo.

Ŝajnas, ke la nova hinda filmo forte dependas de la filmo en Hinda Unio maksimume taŭgis por senpolitikigo kaj kontentigo de la homoj, la nova filmo per sia kritika realismo povas havi konscivekan funkcion. Sed multo dependas de la liberaleco de la ŝtataj institucioj: la ŝtato kiel mondonanto kaj cenzuristo funkcias duoble, kaj ankaŭ en Hindio oni senteme reagas kontraŭ tro kruda realismo.

LA KONEBLA MORGAŬA MONDO

SUBMARAJ URBOJ, KOMPUTIL-STUDENTOJ KAJ MAGNET-TRAJNOJ

Viroj kaj virinoj en brilaj metalvestoj, kun uniformaj frizaĵoj kaj rara rideto sur la maskecaj vizaĝoj paŝas tra atomsekuraj bunkroj kun perturba amaso de miraklaj aparatoj. Ili donas aŭ akceptas misterajn ordonojn, veturas per raketosimilaj sengasaj aŭtomobiloj tra nerealaj pejzaĝoj aŭ fulmas en kosmoglitiloj dum malmultaj horoj al lunbazo...

Tiaj kaj similaj scenoj dum sufiĉe da tempo ne raras sur kinaj kaj televidaj ekranoj. Rimarkinde estas, ke ĉe la aŭtoroj de scienc-fikcio la teknike perfekta estonta mondo neniel aperas pli bona ol la nuna: ankaŭ tie ĉeftemas pri milito kaj perforto, perfido kaj murdo. Ĉu tia estas la realeco de l'futuro – sterila mondo de tekniko kun sensanĝaj estaĵoj, kiuj ja ne sin mem perfektigis, sed nur la homan krimecon!


Kontakto provas en plurparta artikol-serio trovi la veran, realan estontecon, kian la scienca esplorado kapablas profeti hodiaŭ. Tamen, ĉi tiujn artikolojn ne verkas sciencisto, sed ĵurnalisto. Alie oni devus timi, ke nur malgranda parto de la legantaro entute povas kompreni, kaj ke ni tamen havus simile teknike perfektan bildon pri la estonta mondo, kian prezentas al ni supre kritikitaj scienc-fikciaj aŭtoroj. Nin pli multe interesas la homoj de la estonto, kaj la demando, en kiu ĉirkaŭo kaj kia medio ili vivos.

Certe, sur la kampo de tekniko la estonteco jam delonge komenciĝis. En industria nacio kiel Federacia Respubliko Germanio servas jam nun pli ol 40 000 komputiloj, tiuj "pensantaj" elektronikaj kalkulmaŝinoj, inter kiuj la plej multekosta estas pagata per ĉ. 60 milionoj da germanaj markoj.


En proksima estonteco staros en preskaŭ ĉiu loĝejo komputila telefono, en la oficejoj nepre. Per tia telefono oni povos demandi komputilon, kiu respondos ĉiun demandon kaj donos tiun respondon, kiu konformas al la plej aktualaj scio kaj konoj de la homaro.

Tiuj komputiloj anstataŭos kompletajn bibliotekojn kaj enciklopediojn, eĉ multe superos ilin, ĉar la komputiloj neniam malaktualiĝas: Apenaŭ ie en la mondo, ĉu en universitato de Usono, Japanio, Francio aŭ Sovetunio, en iu laboratorio aŭ explorejo oni atingis novan ekkonon, inventon aŭ malkovron: sekundojn poste, la centraj komputiloj ekscias tion en la tuta mondo, konservas la novan scion kune kun la malnova kaj tenas ĝin ĉiuminute vokebla.

Ankaŭ por la ordinara homo tiuj komputiloj estos uzeblaj, nelaste por lernantoj kaj studentoj. Kaj eĉ pli: la teknika monstro povos ankaŭ re-demandi sur malgranda ekrano.



12 Ĉu la estontaj trajnoj, glitante super magnetaj reloj, atingos pohoran rapidecon de 500km?



La revolucio en la lernejo ja ne anstataŭigos la instruiston, sed per tiu disvastiĝo de la inform-tekniko ĝi liberigos lin de la sci-perado por aliaj taskoj, ekz. por pli intensa diskutado pri veraj edukaj temoj: konfliktoj kaj ilia solvo, homa kunvivado kaj socialaj problemoj ks.

Dume, la studento nur parte estos ligita al iu universitato aŭ lernejo. Por la lernado mem, do la transpreno de informoj kaj ekkonoj, li povos ekz. mem sidante en Munkeno partopreni televide prelegon en Hejdelberg, Parizo, Harvard aŭ Oksfordo.

Mondo de totala aparataro?

Konata futurologo, Robert Jungk, profetas ke per la disvastiĝo de la komputiloj disfalos ankaŭ la burokratio, ke la kontaktoj inter registaro kaj civitano estos pli rektaj (ĉar la intera personaro pli kaj pli malaperos) – aŭ ekestos nova burokratio, kiu transprenos la kontrolon de la aparatoj...

La Orvel-an terur-vizion ("1984") pri mondo de totala aparataro taksas li nereala, sed male opinias, ke estonte la homo, kaŭze de la teknika evoluo kaj tiel gajnita pluso de libertempo, retrovos pli da intereso por la komuno. Laŭ li, ekestos etaj "decid-unuoj", en kiuj ĉiu unuopulo povos kunaktivi ĉe la konstruado de la ĉirkaŭo. Eble tiam ankaŭ la nuna zorgo de futurologoj estos malaperinta: Preskaŭ ĉiuj futurologoj bedaŭras, ke inter la nunaj homoj apenaŭ estas interesiĝo pri la estonteco. Kaj vere gravas, ke ĉiu interesiĝu pri la estonteco, ĉar la nunaj homoj ja vaste kaj esence destinas, kia estos tiu estonteco! Ĉar ĉe la supre menciitaj komputil-centroj evidentiĝas, kiel necesa estas amasklerigo. Povus, ekzemple, okazi ke nur "elitoj" havos aliron, se la amaso ne montras intereson (jam nun) pri tiuj gravaj centroj, kaj ke tiuj "elitoj" tiom posedos ilin, ke ili povos misuzi ilin kaj neniu povos malhelpi tiun misuzon.

Tial nepre jam hodiaŭ oni devas krei leĝojn, kiuj malhelpus ke kiu ajn povu senrajte havigi al si avantaĝojn kaj antaŭecon en la informiteco. Tio povus ekz. okazi, se la komputiloj estus programitaj unuflanke, neneŭtrale, nekomplete, do ideologie. Por la futurologoj estas klare, ke devos ekzisti plureco de konkuraj informcentroj, kiuj sin reciproke – kiel la amasmedioj – ankaŭ kontrolas.

Tute klare, ke ankaŭ superaj registar-aparatoj servigos al si komputilojn (kio ja parte jam nun okazas). Kaj por tiuj registaraj komputiloj validas male, ke ili devas esti alireblaj nur al membroj de la registara kaj leĝdona, parlamenta aparato, kiuj ekz. por havigi al si informon el la registara komputilo devas unue sin identigi kaj nur tiukaze povos ricevi informon "supersekretan".

Sed unu efikon ankaŭ la estonteco ne forigos: la abismon inter riĉaj kaj malriĉaj landoj – male: ju pli komputilevoluinta estas lando, des pli riĉa ĝi estos, kaj inverse.

Kaj la persona sfero?

La komputil-tekniko certe ne estos la sola, se jam eble la plej grava sensacio de la estonteco. Apud ĝi la kernenergio gajnos pli kaj pli da graveco; ekde 1990 ĝi supozeble estos la plej malmultekosta energifonto (kaj la plej grava energi-rezervo) entute. Per tio estos solvita ankaŭ unu el la plej pezaj nunaj problemoj de la civilizo: la rapide malkreskanta provizo de energio.

Simile ĉe la alia tre grava problemoj: la mondskala nutrado. Ne estas problemoj de la scienco mastri la malsaton en la mondo. Ties solvo dependas de la politika konstelacio – kaj estos tiel ankaŭ estontece. La marsensaligo, ekz., jam nun estas (scienc-teknike)



En Japanio oni jam eksperimentas per la "gazeto de la morgaŭo": La celo estas liveri faksimilan gazeton per elektrona metodo, tiel ke ĉiu, kiu hejme posedas ricevilon, nur bezonas elpreni sian deziratan ĵurnalon.


preskaŭ perfekta. Jam nun ekzistas nutraĵo en piloloj. La ekologio ankaŭ ne estos problemo, same ne plu la kuracado de iu malsano. (Sed tiujn problemojn ni traktos pli vaste en posta artikolo). Krome, estas klare ankaŭ ke de la homo post la jaro 2000 ne estos sub la jugo de la scienco de la jarmilo, kiom koncernos lian personan vivostilon. Tiel almenaŭ opinias la futurologoj. Anonimeco kaj uniformece tiutempe estos absolute malŝatataj. Ĉiu povos elekti, ĉu li loĝos en "meta-urbo", kie la homoj vivas kaj laboras kiel formikoj, aŭ en disloĝeja pejzaĝo. Se li ŝatas, li povos starigi sian kontenerdometon en unu loko hodiaŭ - kaj kunpreni ĝin al alia loko morgaŭ. Ekzistos submaraj urboj, en kiuj la loĝantoj sentos sin agrable, rigardante fiŝojn kaj submarajn plantojn tra siaj loĝejoj fenestroj - sed ankaŭ klub-loĝejoj, en kiuj oni vivos kiel hodiaŭ en vilaĝo.

Neniu scias precize, kia aspekto la loĝmondo estonta. Sed supozeble oni havos "diferencan loĝkulturon" (kiel diras la futurologoj), do ekzistos tre multaj eblaj formoj unu apud alia. La kimero de "mondurbo" de Los Anĝeles ĝis Pekino tutcerte estas - kaj restas kimero, ne fariĝos realaĵo.

Niaj nepoj estos multe pli moviĝkapablaj ol ni. Certe, ankaŭ por ili vojaĝo al la luno estos lukso, sed cetere por ili distancoj tute ne plu ludos rolon. En gigantaj flugmaŝinoj, kiuj kapacitas pli ol mil pasaĝerojn, ili vagabondos de kontinento al kontinento. Kaj doganistoj estos mirindaĵoj en muzeo. Taksioj transformiĝos al aŭtomataj droŝkoj: kun kreditkarto la pasaĝero eksidas, premas ĉe la direktila komputilo la butonon de sia celo kaj nenion plu faras (resp. legas ĵurnalon, libron aŭ konversacias kun akompananto. La kabenaj taksioj formiĝas al trajno, aŭtomate diskupliĝas ĝustaloke, kaj fine eble la pasaĝero mem direktas ĝin la lastajn metrojn ĝis antaŭ sia loĝejo. Pagi li ne devas, sed fine de la monato aŭtomate oni subtrahas la pagendan sumon de lia konto.

En la urboj ekzistos ankaŭ rultrotuaroj, sur kiuj la piedirantoj (sub tegmentoj) povas majstri kelkajn kilometrojn sen movi unu piedon. La tramoj definitive estos muzeaĵoj, sed ne la subteraj trajnoj kaj la ordinaraĵoj elektrotrajnoj inter la urboj. Sed krome ekzistos fulmtrajnoj, kiuj sur magnet-reloj rapidegos 500 kilometroj po horo aŭ eĉ pli, de grandurbo al grandurbo - pli rapide ol hodiaŭ aviadilo transportas pasaĝeron, ĉar li ja per aviadilo ne povas rekte atingi urbocentron, avantaĝo de tiuj fulmtrajnoj. Estos eble (por preni ekzemplon en Germanio) loĝi en Munkeno kaj labori en Hamburgo, ĉar por superi la distancon oni bezonos nur iom pli ol unu horon. Kiam malaperos la nuna aŭtomobilo kun ĝia benzinodoraĉo, hodiaŭ ankoraŭ neniuj scias - sed ke ĝi malaperos, pri tio ĉiuj samopiniias. Kaj ke la estonteca homo disponos pri multa libertempo kaj laboros nur eron de la nuna tempo, kaj ke lia laboro estos multe pli agrabla - jen preskaŭ memkompreneblaĵo en la okuloj de la futurologoj.

Sed tiun estontecon ebligos nur la homo - la politika homo. La evoluo ne estas aŭtomata. La homo devas decidi, kian parton de la estonteco, kiam kaj kiel li volas realigi. Tamen, antaŭe devas vekigi la manka interesiĝo de la hodiaŭa homo pri la estonteco, kiu ne estas utopio. Se ni volas realigi ĝin, ni devas jam nun lerni ĝiajn sciencajn premisojn.



Konstantaj realigantoj de esperantlingvaj elsendoj de Radio Zagreb: Emiliĵa Lapenna, gvidantino, kaj du junaj parolistoj Darinka Antoniĉ kaj Nikolo Matijeviĉ.

Esperanto en Radio Zagreb - 20 jarojn

"Malkompreno de generacioj" ofte aperas kiel konstato en plej diversaj medioj kaj por plej diversaj aktivadoj. Tio ekzistis kaj ekzistas ankaŭ en Esperanto-movado. Sed tio ne ekzistas en la redakta komitato de Esperantlingvaj elsendoj ĉe Radio-Zagreb. 20 jarojn tiuj elsendoj funkcias kaj en aprilo ĉijara festas sian jubileon. Ekde la fondiĝo ĝis hodiaŭ ĉiam junaj homoj perfekte kunlaboris kun nejunaj gvidantoj de la elsendoj. Tiuj nejunaj dum 20 jaroj ŝanĝiĝis nur 3 foje, sed junaj parolistoj, kutime studentoj, ŝanĝiĝis multe pli ofte. Kunlaboro inter la du generacioj en realigo de la elsendoj estas senriproĉa.

**RADIO ZAGREB, ELSENDO POR
ESPERANTISTOJ: ĈIUJAŬDE 5 MINUTOJN
POST LA NOKTOMEZO LAŬ LA
MEZEŬROPA TEMPO.**

Junulara mondfestivalo en Berlino

La 10a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj okazos de la 28a de julio ĝis la 5a de aŭgusto en Berlino, la ĉefurbo de GDR. Tiuj festivaloj apartenas sendube al la plej grandaj kaj plej gravaj internaciaj junularaj manifestacioj de la mondo. Pluraj dekmiloj da gejunuloj el pli ol 120 landoj dum unu semajno renkontiĝos, diskutos pri aktualaj politikaj problemoj interesaj por la junularo kaj partoprenos eksterordinare riĉan programon. Jam fariĝis bona tradicio, ke ankaŭ junaj esperantistoj havu siajn specialajn renkontiĝojn en la kadro de tiu ĉi festivalo. Tio signifas, ke ankaŭ en 1973 okazos specialaj renkontiĝoj pure esperantistaj. Interalie estas planataj: prelegoj, diskutoj, festa akcepto, Esperanto-filmoj, renkontiĝo kun junaj esperantistoj el GDR.

La moto de la festivalo estas "La junularo de la mondo por antiimperiisma solidareco, por paco kaj amikeco". La internacia festivala komitato tre serioze traktas la esperantistan programon kaj i. a. alte taksas la laboron de TEJO. Ni tial tre ĝojus, se multaj junaj esperantistoj povus partopreni la festivalon. Kiamaniere?

La sola ebleco partopreni estas fariĝi oficiala membro de la festivala delegacio de via lando. Tial estus necesaj jenaj paŝoj: kontakti en taŭga maniero vian nacian preparkomitaton por la festivalo, prezenti al ĝi la valoran nacian kaj internacian laboron de TEJO, kaj instigi la komitaton, ke eniru la nacian delegitaron kelkaj esperantistoj.



Vi povas atentigi vian preparkomitaton, ke okazos esperantista renkontiĝo. Tiun oficialan informon cetere ricevis aŭ ricevos ĉiuj naciaj preparkomitatoj.

Alia ebleco por partopreni la festivalon ne ekzistas. Se vi havas malfacilojn trovi la adresojn de via nacia festival-komitato, bv. skribi al Internationales Vorbereitungskomitee der X. Weltfestspiele, DDR - 108 Berlin, Mohrenstrasse, Deutsche Demokratische Republik.

Kopion de via letero bv. sendi al ni:

TEJO-Sekcio de GDR, DDR - 108, Berlin, Charlottenstr. 60



Sarajeva IJK?!

Krom la mistera foto de mezepoka bosnia steleo (supre), kun ĉi tiu n-ro de K-to vi ricevas ankaŭ la aliĝilon de la 29a IJK en Sarajevo. Lige al la Kongreso, nia venonta n-ro (atendebla komence de julio) ĉeftemos pri ekologio.

Someraj Universitataj Kursoj en 1974

Fine de la jaro 1972, en Lieĝo, la asocio Someraj Universitataj Kursoj iĝis belga leĝe registrita asocio, t.n. 'asocio sen profita celo', kies celo estas okazigi universitatnivelaĵojn kursojn, precipe dumsomerajn, kun Esperanto kiel laborlingvo.

Surbaze de la plena sukceso de la unua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (aŭgusto 1972) estas decidite ke la dua sesio okazu de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974, denove en la modernaj ejoj de la Universitato de Lieĝo en Sart Tilman. Kompare al 1972, la nombro de la studdirektoj estas pligrandigita: okazos kursoj kaj praktikaj ekzercoj pri sociolingvistiko, biologio kaj kemio. Kiel la unua sesio, ankaŭ la dua ampleksos studvizitojn, filmvesperojn, ekskursojn kaj perfektigan Esperanto-kurson.

Tiu ĉi dua sesio de S.U.K. estas certe grava paŝo en la direkto de ĉiujaraj kursoj kaj fine al normala universitata instruado helpe de Esperanto.

Pri kiuj ajn detaloj (programo, kotizoj, stipendioj, partoprenkondiĉoj, kursotekstoj, ktp) skribu al SUK-estraro: Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio).



Ionesco -la olda kolera homo

Okaze de la Salcburga Festivalo pasinta la granda dramverkisto Ejen Ionesco faris la festparoladon, kiu apenaŭ temis pri detaldemandoj de la nuntempa arto, sed pri la bazo por tiu arto, la memkompreno kaj situacio de la homoj sur tiu tero. Ja vere provoka estas tiu profunde pesimisma, sed rekonenda analizo, kiun junaj homoj ne devas neglekti, eĉ se ni ne povas tute konsenti kun ĝi. Jen la traduko:

... Ĉio fariĝis duba. En la pasinta jarcento la homoj ankoraŭ povis kredi sin kapablaj antaŭvidi sian sorton same kiel la historiajn okazaĵojn. Ekde tiam ĉio, kion ili konstruis, fariĝis rompiĝema. Revolucioj, entreprenitaj nome de libereco kaj justeco por libereco kaj justeco, nur alportis tiranecon kaj inferon.

Aliflanke oni kredis je forigo de ekonomiaj problemoj pere de la industria evoluo. Sed la historio, io senracia, povis nur trompi kaj forigi niajn esperojn. Industrio kaj ĝiaj produktoj kondukis nin al la rando de la abismo, la detruo de tero kaj atmosfero. Kosma katastrofo nin minacas. Sed eble jam antaŭe nin estingos la malamo inter la popoloj kaj la seniluziigitaj esperoj de la nacioj kaj klasoj.

La tuta homaro konsciiĝis pri la malfeliĉo vivi, aŭ pli bone, devi vivi sub la nunaj cirkonstancoj. La anoj de kontraŭaj politikaj direktoj ĵetas sin unu kontraŭ la alian, kaj tiuj, kiuj rifuzas politikon, sopiras la finon de la homoj kaj ties memmortigon en mondo de kruelo kaj perforto. Ĉiu timas ĉiun.

Precipe inter la junaj homoj ankoraŭ ekzistas kelkaj saĝaj kapoj, kiuj ne rezignacias nek emas atendi la neeviteblan katastrofon. Ili apelacias al la konscienco de la mondo por haltigi la preparadon al la universala detruo kaj ĝin entute malhelpi. Sed la konscienco de la mondo ne vekiga. Ne ekzistas vojo malantaŭen. La gigantaj detruiloj, la milionoj da produktoj, kiuj venenigas teron, akvon kaj aeron, nur povas obliĝi kaj ĉion neniigi.

Tion oni nur povas dedukti de la detruemo kaj la malamikeco inter la homoj. Ni vivas en epoko de la kolero. Nur la kolero nin nehaltigeble povos konduki al la pere. Nia civilizo estis serĉanta la feliĉon kaj suferis nur malvenkon, malfeliĉon kaj morton. Mi estas homo

inter tri miliardoj da homoj. Kiel do mia voĉo povas esti aŭskultata? Mi predikas en troloĝata dezerto, kaj nek mi nek aliaj povas trovi eliron. Mi opinias, ke ne ekzistas eliro.

FINON AL LA HOMA AVENTURO?

Se la homoj ne estus volontaj sian detruigon, ja ĉio ankoraŭ povus esti turnita al la bono. Nek estus ekzistantaj ekspluato de la homo far la homo nek la genocidoj. Kaj kial ĉio ĉi venis?

“Kial ni ne amas unu la alian?” demandas mirinde naive la idioto ĉe Dostojevski. Aŭ kial ni ne almenaŭ indiferece vivas unu apud la alia? Amiko, kiu suferas pro la malfeliĉo de la homoj, diris al mi: “La homa aventuro jam tro longe estas daŭrinta. Ni devas meti finon al ĝi!”

La tielnomata kontraŭburĝa liberiĝo de ĉiuj emoj, kiujn predikas la modfilozofoj, nin nur des pli rapide kondukos al universala orgio, al detruo de la kulturo, al la fino de ĉio. Sed kio lasta-esence estas tiu kulturo? Sendube nur ŝirmvando, kiu kaŝis nian angoron antaŭ mizero, naŭzo, tristo, teruro kaj precipe antaŭ la morto for de ni mem.

Nenia socia ordo nin povas kontentigi; dekstraj aŭ maldekstraj, ĉiuj estas inferecaj. Totalecaj reĝimoj kapablas certigi sian ekziston per propagando kaj firmiteni la subulojn per stultigaj sloganoj. Ĉio malhavas firman bazon. La religioj senfortiĝis. Ĉio estas elĉerpita kaj senprotekta. En la libroj aŭ en la rigardoj de niaj kunhomoj speguliĝas la propra disŝiriteco. Sufiĉas unu vorto, kaj la amasoj ekalsaltas unu la alian aŭ memmortigas sin.

ĈU NI VOLAS LIBERON AŬ SUBIĜON?

La stratoj de Hindio estas plenŝtopitaj je kadavroj de mizeruloj. En Skandinavio duobliĝis la nombro de memmortigoj inter la riĉuloj, la gejunuloj konsumas drogojn. Al ili restas kaŝita, sen idealo kaj sen estonto, la senco de la vivo.

Laboristoj abomenas la laboron. Kie estas instruistoj,

kiuj klerigas pri ĉio ĉi? Al tri kvaronoj de la mondo mankas manĝo, al la tuta mondo spirita nutro. La solvo de ekonomiaj problemoj ne sufiĉas; stariĝas la demando, kiel satigi alian malsaton.

Marksisto aŭ psikoanalizisto, kontraŭulo de Frojd aŭ disĉiplo de Niĉse, ĉiu filozofo staras antaŭ la sama problemo: Kiel vivi? De kio liberiĝi por vivi? De niaj instinktoj, de la malpermesoj, de la revolucio, de la kontraŭrevolucio?

Oni ne plu trovas la ekvilibron en la pasio vivi, do la netrankviligeblaj emoj, kaj la mekanismoj, kiuj povas kateni ilin. Pasioj interpuŝiĝas kaj la imperiismoj de la oriento kaj okcidento dronigas la mondon en atmosferon de perforto, kiu ne plu korespondas al iu ideologio. Oni ne volas helpi la malriĉulojn, nek defendi la justecon kaj forigi malsaton kaj soifon. La celo estas la alternativo: superrego aŭ buĉado.

Jam delonge ni scias, ke la totalecaj socioj havas la plej rigorajn burĝajn burokratiojn de la mondo. Kaj ĝuste tien turnas sin, scie aŭ nekonscie, la junaj burĝaj kontraŭ-burĝuloj. Eble ĉar la okcidenta burĝismo moliĝis, ili instinkte preferas rigoran burĝismon kun funkciuloj, polico kaj necedemaj patroj.

Ne estas kontraŭdiro, se mi diras, ke la junularo senorientiĝe ŝanceliĝas inter la deziro al libera disvolvo de ĉiaj emoj kaj la deziro al subiĝo sub senmoveblan ordon.

Ni ne scias, kion ni volas. Ni ne komprenas, kio nin gvidas. La senraciaj fortoj transcendas nian racion. Ni probable volas fari samtempe sin kontraŭantajn aferojn.

Mi opinias, pensante je Spengler, ke ni staras antaŭ la batalo pri la monda imperio. Fortaj landoj disputas pri la posedo de la mondo okupante pli malgrandajn naciojn ekonomie kaj politike. Apologie de liberigo, sed envere puŝe de soifo al regpovo ili intervenas en la vivon de la mapli povaj.

LITERATURO: SEN FELIĈA FINO

Ni vidis, ke nin trompis la kulturo. Ni kredis, ke ĝi nin liberigos de timo kaj senespero kaj ke ĝi la savon alportos. Oni povas ankaŭ diri, ke ni esperis, ke ĝi servos kiel deponejo de nia mizero. La krizo de la kulturo kaj civilizo sendube konstatigis. Ĉu vi konas multajn verkojn de la literaturo, kiuj estas facilaj kaj gajaj? Ĉu vi vidas multajn dramojn kiuj feliĉa fino aŭ dramojn montrantaj vojon al ni?

Nia malfeliĉo kontraŭe aperas pli grava, prema kaj neevitebla ol iam ajn. Nek arto, nek literaturo, nek teatro trovis rimedon kontraŭ la doloro de nia animo. Ili ĝin nur pliintensigis kaj senbridigis niajn pasiojn. La malbono, kiun kulturo volis denunci, des pli konsciigis al ni. La kulturo ĵetis nian malfeliĉon kaj mizeron en niajn vizaĝojn kaj detenis sin doni al ni solvojn kaj terapiojn.

Eble la tutmonda politikigo ekstremisma fontas en nia malespero. Kelkaj eble kredas, ke tion, kion rifuzis doni muziko kaj literaturo, donos al ni la politiko. Sed ĝi nur perfektigos la pereon de la homo. La ekspluato de homo far homo ne plu estas la ĉefproblemo. Pli vere, tio estas la pli malmodera emo al la superrego de homo far homo. Eliro estas la soifo al regpovo, kiu havas paranojajn trajtojn. En ĉiuj partoj de la mondo la psikopatoj de la regpovo subjugigas centojn da milionoj da homoj. La plej fanatikaj anoj de la libereco submetiĝas kaj propagandas la plej kompromisajn dekretojn kontraŭ la libereco.

Evidente la sopiro al libereco envere nur estas la deziro al pli da subjugigo. Sub la masko de libereco aperas la vera vizaĝo de la volupto esti sklavo. Ŝajne signifas faciligon, se oni vivas sklavece kaj rezignas, veni al si mem. Sed tiu faciligo ne daŭras. La subpremitaj ne estas sufiĉe subpremitaj, ili volas esti devigitaj, ĉiun tagon pruvi la totalan subjugigon kaj senkondiĉan rezignon pri sia personeco.

La homo plu ne rajtas esti homo, sed li devas esti sociigata absolute kaj totale. Fremdigita, kun nedifinita animo kaj personeco. Se oni rezistas tion, ekestas la infero. En la liberaj, ankoraŭ liberaj, ŝtatoj oni apenaŭ tion registras, kontraŭe, oni alcelas la saman dogmecan politikigon. Ĉu la eksplodo de la voluptoj vere postulas bridon? Ĉu libereco devas finiĝi per sklaveco? Kie estas eliro?

REVOLUCIOJ NE ALPORTAS FRATIĜON

Se la vivo malbonas, la homoj sin malamas, oni nek sin nek la proksimumon amas. Se ĉio netolereblas kaj la sciencoj kaj la kulturoj ne scias respondon al la plej gravaj demandoj, tiam la homo en la politiko serĉos respondon al siaj demandoj.

Ni vidis, ke politiko apenaŭ povas kontentigi la plej esencajn bezonojn de la homo. Baldaŭ estos ducent jaroj, depost kiam oni faras revoluciojn. Ili daŭros, la mito de la revolucio kiel regenerilo plivastiĝos, plejmulto de la homoj estos ĝia ĉasaĵo, kvankam la malvenko kaj bankroto de la revolucioj alie nin instruis. La politikaj gvidantoj de la nuntempo ne amas la homojn, ili volas la homojn-instrumentojn. Se mi diras, ke oni amikece intertraktu kun ili, oni min priridaĉos. Nature, ĉar nur ekzistas rilatoj de perforto. Sed ĉu ne la krederoj de la revoluciuloj estas: frateco, fratiĝo, kamaradeco, unueco, konkordo, libereco, egaleco? Se mi ne povas preni seriozaj la nociojn de la revolucio, kiel mi do serioza prenu la revolucion mem? Kiel mi fidu pri la revolucioj, se ili nek amikecon nek fratecon alportis aŭ restarigis? Ili eĉ ne provis tion. Kiam revolucio ekestablis sin, ĝi pensas pri puno, repago kaj revenĝo. Revolucioj ne okazas nome de, nek por la amo. Amikeco estas nocio, kiun forigis la politiko. Amo kaj spiriteco ne fariĝis ridindaj, sed nocioj, kiuj ne plu ekzistas. Ni forgesis, kio povas esti spiriteco. Ni nek vidas, nek povas rigardi al la ĉielo. Ni ne povas halti en la ĝenerala urĝado, por dum momento senmove rigardi tiun urĝadon. Nek la proksimumon, nek la malproksimumon de nia mondo ni vidas. Ni perdis la plezuron ĝin rigardi.

Tradukis H.M. Majcen



Gravaj taskoj por afrika gazetaro

Ĵurnalistoj el ses okcident-afrikaj ŝtatoj, Gabono, Kongo, Malio, Nigerio, Senegalo kaj Togo, fondis, por la unua fojo en Afriko, asocion de ĵurnalistoj de la kampara gazetaro. Provizora sidejo de la organizaĵo estas en Bamako, la ĉefurbo de Malio, en la redaktejo de la gazeto *Kibura*.

La fondiĝon antaŭis seminario, organizita en Bamako de Unesko en kunlaboro kun la malia registaro. Ties celo estis akceli la inform-organojn por kamparaj regionoj, aparte por tiuj, kiuj nur lastatempe estis atingitaj de alfabetiga kampanjo. Al la diskutaj temoj de la seminario apartenis problemoj de redaktado kaj enpaĝigo, la avantaĝoj de diversaj presprocedoj, la malfacilaĵoj de la ekspedado de gazetoj en regionoj, kiuj apenaŭ disponas stratojn nek aliajn transportajn eblecojn, kaj la instigado al legantoj skribi leterojn.

Malmulte surprizas, ke la problemoj tuŝitaj ne tre diferencis, malgraŭ la diversaj lingvoj, en kiuj aperas la gazetoj, kaj malgraŭ la malsamaj kondiĉoj en la unuopaj landoj. Tra ĉiuj interparoloj tiriĝis kiel ruĝa fadeno la principo samaj komplikaj: nesufiĉaj produktaj rimedoj kaj altaj ekspedokostoj, manko de kunlaboro kaj koordinado inter la diversaj agentejoj, neekzisto de fidindaj

statistikoj pri la kampara loĝantaro kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, nekontentiga planado kaj prizorgado de la eldonaĵoj, neefika administrado ktp.

Unu el la ĉefaj taskoj de la nova okcident-afrika ĵurnalista asocio estos la interŝanĝo de informoj kaj spertoj. Alia ero en la programo estas la profesia edukado de ĵurnalistoj por la kampara gazetaro. Multaj problemoj fontas en tio, ke la eksterurba gazetaro en Afriko estas relative freŝdata, plejparte ankoraŭ troviĝante en la stadio de eksperimentado. Nur malmultaj gazetoj ekzistas jam de kelkaj jaroj. La plej multaj, pri kiuj oni parolis dum la seminario en Bamako, eĉ ne atingis jam unu plenan jaron.

La kresko de tia gazeto-speco estas rekta rezulto de la sukcesaj kampanjoj en afrikaj ŝtatoj por klerigo de plenkreskuloj. La novaj periodaĵoj ofertu al la eksanalfabetoj interesan kaj utilan legaĵon por elimini la danĝeron, ke ili refalu en nescion. Tio aparte validas por tiuj landoj, kiuj decidis organizi siajn klerigajn kampanjojn en afrikaj lingvoj. Ĉar la plej gravaj gazetoj de tiuj ŝtatoj ordinare aperas en angla aŭ franca lingvo, ili malmulte utilas al homoj, kiuj ĵus lernis kiel legi kaj skribi. Jen por la afrikaj kamparaj gazetoj malfermiĝas granda tasko kaj, estonte, efektivaĵoj sur la merkato.

Kontaktoj kun Kontakto



ĈU NUR FORGESEMO?

Pri via decido, kiel anoncote ĉe paĝo 6 de la aŭgusta n-ro de KONTAKTO, kaj la argumento de Bun-Ĉambro (Bunnie Chambers) en la sekvanta eldono, temante pri esperantistaj propraj nomoj.

Mi ne konsideras la sugestojn de Bun-Ĉambro groteskaj; ili nur ĵukigas min en loko ne gratebla. Tio estas, la punktoj estas trafaj kaj logikaj, kaj eĉ fidiinde spegulas la opinion de Zamenhof en la letero al berlinaj esp-istoj en 1904. Tamen, tamen. La slavaj kaj aziaj lingvoj estas plejparte fonetikaj kaj tial facile transskribeblaj en Esperanton. Oni diras, ke la nederlanda estas ankaŭ regula kaj fonetika, sed certe ne videble. La anglalingvaj nomoj suferas pleje, pro la (de anglalingvuloj tiel nomita) riĉeco de sonoj. Verŝajne la rusoj, poloj, finnoj, japanoj, ĉinoj ktp. ne havus malfacilaĵon. Germanoj devus prizorgi la f, v, w, kaj z literojn

(prave la fon, von, germanavon, kaj zon/con, sed ŝajnas strange, ĉu ne?) kaj pri la francoj, nu - nur la francoj povas prononci siajn nomojn iukaze, kaj oni eĉ aŭdas argumentojn inter ili pri tio.

Vi faris revolucion decidon, kiu ne estas tuja solvo sed certe malfermis la "skatolon de vermoj" sur kiu sidis jaroj da silento pri la problemoj.

Finfine taŭga batalkampo kaj pensigilo, ne bagatela ombraĵo kiel la ata-ita frufruaĵo! Majstro Auld (pardonu, Oldo) deziras, ke vi obstinu sur tiu vojo. Ankaŭ mi, sed min iom dubigas la fakto, ke en ambaŭ la aŭgusta kaj oktobra n-roj vi ne sekvis vian propran decidon pli ol 50%. Ĉiuj nomoj de la TEJO-Estraro, Aliĝintaj landaj sekcioj kaj Nealiĝintaj sekcioj restis netuŝite nacilingvaj.

Ĉu nur ekzercado de la kvara principo de via deklaro? Ĉu nur forgesemo? Ĉu *grila priva vorgeresi*?

Fortkasko Agordo (William Harmon)

KIO ESTAS LA NOMO?

Mi trovas interese - kaj ne sensignife - ke amiko Haŭpental, tiu senlaca advokato de la scienca metodiko, ĝuste pri la propraj nomoj opinias konvene rezigni pri ĝi favore al terminoj pure emociaj: maroto, kurioza praktiko, ridindaĵo, naivo, kaprico, dogmo. (Eble estas por mi bone, ke mi ne scias, kio estas "abderito"!).

Mi scivolos, kio estas la nomo (kiel ajn oni skribus ĝin) de tiu "kompetentulo", per kiu, laŭ li, vi devus "ekspertizi la aferon"? Espereble tiu almenaŭ scius ekspertizi senemocie!

V. Oldo

P.S. Ĉar R.H. interesiĝas pri etimologio, cetere, eble mi klarigu, ke mia nomo etimologie signifas probable ne "olda", sed "alta". Aŭ eble eĉ inverse. Eĉ en la angla lingvo ne multe gravas...

MOZAIKO

Unujara karcero pro "Plejboj"

La 29-jara germana enmigrinto Hajnc Volfard Butlevic devis en Johanesburgo (Sudafriko) pagi punon de 300 randoj kaj krome estis verdiktita kondiĉe je unujara karcero, ĉio ĉi pro la fakto, ke en lia hejmo troviĝis kelkaj n-roj de la magazino "Plejboj" (Playboy), unu "eduka" seks-libro kaj kelkaj eltondaĵoj de gazetoj similtemaj. Proklamante la verdikton, la juĝisto konsilis al la punito, ke li "en Romo konduku kiel romano", kaj aldonis, ke la puno estas tiel "milda" pro la fakto, ke la kulpigaj materialoj estis aĉetitaj en la Okcidenta Germanio, "lando kun malpli severa moralo ol estas tiu de Sudafriko".

Enspezigaj eraroj

En "Malferma letero al la pedagogoj de la mondo" la franca lernanto Marten Leru skribas i.a.: "La malbonaj lernantoj estas la

labordonantoj de la instruistoj, ĉar se ni ne farus erarojn, la instruistoj havus nenion por korekti. Oni do povas diri, ke malbonaj lernantoj garantias la plenokupitecon de la instruistoj kaj per tio iliajn laborlokojn. Bedaŭrinde, la sinteno de multaj instruistoj kontraŭ la malbonaj lernantoj pruvas, ke ili ankoraŭ ne konscias pri la ekonomia signifo de tiu interrilato."

Granda helpo

Indira Gandhi, la ĉefministrino de Hindio, ŝajne scias, kion ŝia popolo plej urĝe bezonas. Hinda ambasado en eksterlando raportis jene pri ŝia vojaĝo tra krizaj regionoj de la lando: "Komence de tiu ĉi monato ŝi vizitis dek unu distriktojn trafitajn de senpluveco kaj informiĝis pri la helpo donita en Maharaŝtra. Per tio la ĉirkaŭ 20 milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj suferantaj sub la sekeco kaj starantaj laŭlonge de la stratoj, kiujn traveturis la ĉefministrino, ricevis

helpon en ia vera senco. Laŭ la vortoj de la konata poeto V. V. Ŝirvadkar, kion la popolo vere bezonas krom mono, nutraĵo kaj laboro, estas kuraĝo, konsola vorto kaj kompato flanke de la gvidantoj, kiuj ĝuas ĝian fidon."

Elsendoj sen aŭskultantoj

La radio-stacio "Germana Ondo" en Kolonjo, financata per ŝtataj rimedoj, dissendas al eksterlando ĉiutage dum 89 horoj en 33 lingvoj. Kritikante la sensisteman elektadon de la uzataj lingvoj, la semajna revuo *Der Spiegel* emfazis jenan kuriozaĵon: "Fakte la voĉo de (Okcidenta) Germanio komencis, por komplezi al fakestro enamiĝinta al azia kulturo, dissendi - kiel unua kaj ĝis nun sola stacio en tiu ĉi mondo - en lingvo, kiun krom sciencistoj neniu komprenas: en la klasika hinda lingvo sanskrito. Kvankam la iniciatinto delonge estas pensiita, Kolonjo parolas plue sanskrite - 'Kiel omaĝo de la genio germana al la genio hinda'... Sed: En Hindio mem neniu radio-stacio omaĝas al la genio hinda."

"Germana Ondo" ne dissendas en la bengala lingvo, kiun komprenas ĉ. 100 milionoj da homoj.

EL Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,- gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,- gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



Anoncetoj

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun fotoamatoroj; Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan beletraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankantan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de ĉiu kopio (sur kiu staras 2 paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, se eble, la eldonjaron. Adreso: Fotokopia Servo, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

La dolĉa Franclando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr.fr. aŭ: 38 fr.fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

La Eta Princo de Saint-Exupéry estas ĉarma 102-paĝa ilustrita libro "por infanoj", verdire kun *altnivela filozofio!* Mendu ĝin ĉe la tradukinto B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source. Prezo: 28 fr.fr., afrankite.

Ludoviko en Nederlando, supera kurslibro por franclingvanoj, multe progresigos vin. Prezo afr.: 35 fr.fr. Ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, 45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

